Atenton! Atenton! (uwaga!) La lernanto N. ne atentas, sed li parolas kun sia kolego-najbaro. La lernanto X. ankaŭ ne atentas, sed li atendas finon de la leciono — li estas malsana.

Atenton! Sur la tabulo mi skribas la belan kaj gravan vorton **ESPERANTO**. La vorto konsistas el silaboj. En la vorto E-SPE-RAN-TO estas kvar silaboj. La silaboj konsistas el literoj: vokaloj kaj konsonantoj. Silaboj formas vortojn kaj vortoj formas frazojn.

Ĉu vi ŝatas longajn frazojn? Ne, ni ne ŝatas longajn frazojn, sed ni ŝatas la belajn kaj mallongajn frazojn.

Sur la tabulo estas multaj vortoj. Mi prenas unu malbelan objekton (gąbka) kaj faras la tabulon pura. Sur la pura tabulo mi skribas per la kreto unu gravan frazon: Bonaj geknaboj ne batas kaj ne turmentas dombestojn.

Atenton! Atenton! Hejme vi skribas kaj respondas miajn demandojn. Ĉu vi komprenas? La demandoj estas:

1. Ĉe kiu strato vi loĝas?
2. Ĉu vi havas belan hejmon?
3. Ĉu via familio estas granda?
4. Ĉu ni loĝas en Aŭstralio?
5. Ĉu en oficejoj estas litoj?
6. Kion faras homoj en legejoj?
7. Ĉu Jagiellona Biblioteko estas granda?
8. Ĉu en nia urbo estas laktejoj, kafejoj, bierejoj, laborejoj?
9. Ĉu Svedujo estas en Afriko?
10. Kiuj homoj laboras en fabrikoj?

Gelernantoj! El la poŝo mi prenas la „gravan objekton". Ĝi iras kaj iras kaj montras la finon de la konversacio. Mi finas kaj salutas vin per la vortoj „Bonan nokton!" Ĝis la revido!

6. LECIONO SESA

A. GRAMATIKO

Zaimki i przysłówki pytające

(demandaj vortoj)

KIU?	— kto? który?
KIO?	— co?
KIA?	— jaki? -a? -e?
KIE?	— gdzie?
KIEN?	— dokąd?

Wyraz polski **sam** tłumaczy się przez nieodmienny wyraz **mem**, np. mi mem skribas la leteron — sam piszę list (a nie kto inny).

Sam (jeden, jedyny) — znaczy **sola**, np. mi sola estas en la ĉambro — sam jeden jestem w pokoju.

Ten sam — tłumaczy się przez **sama**, np. la samaj knaboj — ci sami chłopcy; mi legas la saman libron — czytam tę samą książkę.

Przyrostek **an** oznacza przynależność do czegoś, np. **ano** — członek, **urbano** — mieszczanin, **kursano** — kursista.

B. VORTOJ

Azeno — osioł, **ĉevalo** — koń, **bovo** — wół, **bovino** — krowa, **kapro** — koza, **ŝafo** — owca, baran, **porko** — świnia, wieprz, **vosto** — ogon, **vesto** — ubranie, odzież, **kapo** — głowa, **haro** — włos, **ĉapelo** — kapelusz, **mono** — pieniądze, **mano** — ręka, **piedo** — noga, **okulo** — oko, **orelo** — ucho, **nazo** — nos, **buŝo** — usta, **koro** — serce, **butono** — guzik, **manpoŝo** — torebka, **koloro** — barwa, **ŝinko** — szynka, **kolbaso** — kiełbasa, **kurso** — kurs, **terglobo** — kula ziemska, **amiko** — przyjaciel, **bastono** — kij, laska, **spegulo** — lustro, **obstina** — uparty, **multekosta** — kosztowny, **blonda** — blond, płowy; **diversa** — różny, **utila** — pożyteczny, **kostas** — kosztuje (cena), **vidas** — widzi, **aŭdas** —

słyszy, **manĝas** — je, zjada, **kantas** — śpiewa, **flaras** — wącha, **pensas** — myśli, **sentas** — czuje, **diras** — rzecze, mówi, **partoprenas** — uczestniczy, **ses** — sześć, **ke** — że.

C. KONVERSACIAJ EKZERCOJ

Homoj, kiuj loĝas en urboj, estas urbanoj, kiuj loĝas en Krakovo, estas krakovanoj. Esperanta Kurso estas kurso, en kiu (kie) gekursanoj lernas internacian lingvon Esperanto. Gelernantoj kaj aliaj personoj, kiuj partoprenas en la Esperanta Kurso, estas gekursanoj.

Ĉu krakovaninoj estas belaj, bonaj, elegantaj kaj inteligentaj?

Ĉu nia Esperanta Kurso estas multpersona?

Kion ni faras per la vortoj: Kiu? Kio? Kia? Kie? Kien?

Per la vortoj... ni demandas.

Kiaj vortoj estas ili?

Ili estas demandaj vortoj.

Ĉu la koloro de la tabulo kaj de la papero estas egala?

Ne, la koloro de la tabulo kaj de la papero ne estas egala, sed ĝi estas malegala.

La koloro de la tabulo estas nigra kaj de la papero estas blanka.

Homoj, kiuj trinkas fortan kafon aŭ brandon, havas malfortan koron. Ilia koro batas tre forte.

Ĉu viaj koroj batas tre forte?

Ne, niaj koroj ne batas tre forte — ni estas korsanaj.

Bestoj, kiuj loĝas kun homo aŭ ĉe homo kaj helpas ĝin en laboro, estas dombestoj (hejmbestoj). Al ili apartenas: hundo, kato, ĉevalo, bovo, bovino, azeno, kapro, ŝafo kaj porko. La dombestoj havas unu kapon, kvar piedojn kaj unu voston. La eleganta kaj forta besto estas ĉevalo. Ĝi estas ankaŭ tre utila besto. La ĉevalo havas voston kun tre longaj haroj. Hundo estas tre inteligenta besto. Ĝi komprenas, kion homoj diras al ĝi. Per la vosto ĝi montras, ke ĝi estas feliĉa. Hundo estas ankaŭ fidela besto kaj nia bona amiko. Porko estas dika kaj malpura besto. Homoj donas (dają) al ĝi malpurajn manĝ-

objektojn kaj ili faras ĝin dika. Ni ne ŝatas porkon, sed ni tre, tre ŝatas bonan ŝinkon kaj kolbason. Azeno estas ankaŭ inteligenta besto, sed ĝi estas ankaŭ obstina. Azeno de Polujo komprenas azenojn de Hispanujo kaj de Italujo. Ĝi komprenas azenojn de la tuta mondo. Sed „inteligentaj" homoj ne komprenas homojn de aliaj landoj. Nur esperantaj homoj, esperantistoj, komprenas esperantistojn de la tuta terglobo.

Ĉu azenoj ne estas inteligentaj bestoj? Jes! jes!

Per bastono homo faras la azenon malobstina. Sed pola instruisto ne faras per bastono la malbonan lernanton bona.

Ĉu vi ŝatas obstinajn homojn? Ne, ni ne ŝatas obstinajn homojn.

Homo havas unu kapon, du manojn kaj du piedojn. Sur la kapo estas haroj. La koloro de la haroj estas blonda, nigra aŭ griza. Per la manoj ni laboras, per la piedoj ni iras. Ni havas du okulojn, du orelojn, unu nazon kaj unu buŝon. Per la okuloj ni rigardas kaj vidas. Per la oreloj ni aŭskultas kaj aŭdas. Per la buŝo ni trinkas, manĝas, kantas. Per la nazo ni flaras. Per la kapo ni pensas kaj per la koro ni sentas.

Sur homo estas vesto. Mia vesto estas nigra, malnova, malmoderna kaj neeleganta. Mi ne estas riĉulo, mi ne havas multan monon. Ĉu vi komprenas? Sinjorinoj tre ŝatas belajn vestojn kaj modernajn ĉapelojn. Sed la vestoj kaj ĉapeloj kostas multan monon — ili estas multekostaj. La vesto havas poŝojn kaj butonojn. Sinjorinoj havas poŝojn en la mano — ili havas manpoŝojn. En manpoŝoj estas grandaj sekretoj kaj diversaj gravaj objektoj. Unu malgranda objekto diras al sinjorino, ke ŝi estas tre bela. Ĝi estas spegulo.

Atenton! Mi donas al vi novajn demandojn — ili estas:

1. Kion donas al homoj bovino?
2. Ĉu ni flaras belajn florojn per la buŝo?
3. Ĉu vi havas hejme grandan spegulon?
4. Kion diras al vi via spegulo?
5. Per kio ni rigardas kaj vidas?

6. Kion ni faras per la buŝo?
7. Ĉu vi kantas bele?
8. Ĉu en krakovaj teatroj estas gekantistoj?
9. Ĉu vi havas hejme skribmaŝinon?
10. Ĉu vi skribas leterojn per maŝino aŭ propramane? (własnoręcznie).

Gekursanoj! Mi finas la sesan lecionon kaj ni iras hejmen. Bonan nokton! Ĝis la revido!

7. LECIONO SEPA

A. GRAMATIKO

Zaimek zwrotny na 3-cią osobę jest **si** (siebie).

Dodając do niego końcówkę **a** tworzymy **zaimek dzierżawczy sia** swój, -a, -e, np. La patros estas en sia ĉambro — ojciec jest w swoim pokoju. La patrino skribas al sia filino kaj al ŝiaj infanoj — matka pisze do swojej córki i do jej dzieci.

Odmiana czasownika z zaimkiem **swój**

Liczba pojedyncza:

1. mi havas mian libron — mam swoją książkę
2. vi „ vian „ — masz „ „
   li „ sian „ — ma „ „
3. ŝi „ sian „ — ma „ „
   ĝi „ sian „ — ma „ „

Liczba mnoga:

1. ni havas nian libron — mamy swoją książkę
2. vi „ vian „ — macie „ „
3. ili „ sian „ — mają „ „

Przyrostek **il** oznacza narzędzie lub środek do wykonywania danej czynności, np. ŝlosi — zamykać na klucz, ŝlosilo — klucz, tranĉi — krajać, tranĉilo — nóż.

B. VORTOJ

Avo — dziadek, **onklo** — wuj, stryj, **filo** — syn, **frato** — brat, **gefratoj** — rodzeństwo, **fraŭlo** — kawaler, **fraŭlino** — panna,

kajero — zeszyt, **plumo** — pióro, **spongo** — gąbka, **nomo** — nazwa, nazwisko, **antaŭnomo** — imię, **plezuro** — przyjemność, **literaturo** — literatura, **poŝtranĉilo** — scyzoryk, **kvalito** — jakość, przymiot, **verbo** — czasownik, słowo, **loko** — miejsce, **direkto** — kierunek, **kutimo** — zwyczaj, obyczaj, **sporto** — sport, **gimnastiko** — gimnastyka, **sportulo** — sportowiec, **klubo** — klub, **pulso** — puls, **ŝtono** — kamień, **propra** — własny, **ordinara** — zwyczajny, zwykły, pospolity, **preciza** — dokładny, ścisły, punktualny, **kuraĝa** — śmiały, odważny, **kara** — drogi, **lerta** — zręczny, biegły, **kapabla** — zdolny, **konsistas el** — składa się z, **donas** — daje, **kisas** — całuje, **ŝlosas** — zamyka na klucz, **tranĉas** — kraje, tnie, **marŝas** — maszeruje, **saltas** — skacze, **preparas** — przygotowuje, **ĵetas** — rzuca, **proksime al...** — blisko czegoś, **malproksime de...** — daleko od..., **rapide** — szybko, **antaŭ** — przed, **malantaŭ** — za (czym), **inter** — między, **sep** — siedem, **nun** —teraz, obecnie.

C. KONVERSACIAJ EKZERCOJ

Familio konsistas el gepatroj kaj infanoj. Al familio apartenas ankaŭ avo kaj avino (geavoj). Gepatroj havas unu knabon — li estas ilia filo kaj unu knabinon — ŝi estas ilia filino. Ni diras, ke la gepatroj havas du gefilojn. La filo de la laboristo havas tri fratojn kaj unu fratinon — li havas kvar gefratojn. La frato de la patro aŭ de la patrino estas nia onklo; la fratino de la patro aŭ de la patrino estas nia onklino.

La instruisto staras antaŭ la tabulo kaj li skribas per la kreto mallongajn frazojn. Malantaŭ li sidas gekursanoj en la benkoj, sur la benkoj aŭ sur la seĝoj. Inter la tabulo kaj la benkoj estas la instruista tablo. Sur la tablo kuŝas kelkaj objektoj. Inter ili estas la lernolibro. La objektoj havas nomojn. La nomo de la objekto estas **spongo**. Personoj havas nomojn kaj antaŭnomojn. La vorto **Kowalski** estas nomo, la vorto **Johano** estas antaŭnomo. La nomoj ne estas egalaj — estas propraj kaj ordinaraj nomoj. Propraj nomoj estas: Karlo, Krakovo, Johano...

Ordinaraj nomoj estas: tablo, rozo, hundo... La proprajn nomojn ni skribas per la grandaj literoj kaj ordinarajn per la malgrandaj.

La plumo apartenas al la lernanto N. — ĝi estas lia plumo.

Ĉu la kajero estas via? — Ne, la kajero ne estas mia, sed ĝi estas ŝia.

Ĉu la tabulo estas **proksime al** mi? — Ne, la tabulo ne estas proksime al vi, sed ĝi estas **malproksime de** vi.

Ĉu la urbo Wieliczka estas proksime al Krakovo? — Jes, la urbo Wieliczka estas proksime al Krakovo.

Ĉu la urbo Gdańsk estas proksime al Krakovo? — Ne, la urbo Gdańsk ne estas proksime al Krakovo, sed ĝi estas malproksime de Krakovo.

Esperantistoj (-inoj) estas bonaj kaj inteligentaj homoj — ili parolas forte, kuraĝe kaj elegante. La lernanto N. donas al la lernantino Walkowiak sian lernolibron kaj ŝi diras al li: „Dankon"! La lernanto respondas al ŝi: „Kun plezuro"!

Parto de la vorto „multa" estas „kelkaj". „Ses, sep..." estas precizaj vortoj, „kelkaj" estas malpreciza vorto.

Ĉu la lingvo Esperanto estas preciza lingvo? — Jes, ĝi estas preciza.

Ĉu en Esperanto ekzistas libroj kaj gazetoj? — Jes, en Esperanto ekzistas multaj libroj kaj gazetoj.

La bona infano salutas matene sian karan patrinon kaj kisas ŝian manon. Fraŭloj kaj sinjoroj en nia lando kisas ĉe saluto manojn de fraŭlinoj kaj sinjorinoj. Francoj, Angloj, Italoj ne kisas manojn de fraŭlinoj kaj sinjorinoj — ĝi estas nur pola kutimo.

Ni eliras el la hejmo en la urbon kaj ni ŝlosas nian loĝejon per ŝlosilo.

Ĉu ni tranĉas la paperon per ŝlosilo? — Ne, ni ne tranĉas la paperon per ŝlosilo, sed ni tranĉas ĝin per tranĉilo.

Ĉu vi havas poŝtranĉilon? — Ne, mi ne havas poŝtranĉilon, sed mia frato havas tre belan poŝtranĉilon.

Ĉu la pordo havas ŝlosilon? — Jes, la pordo havas ŝlosilon.

Ĉu estas ŝlosiloj al la homa koro? — Ni ne scias...

Mi diras al vi: Al la homa koro estas ankaŭ ŝlosiloj. La ŝlosiloj al la homa koro estas: la bela vorto „amas", ruĝaj rozoj, bona libro, bela kanto, mono kaj la lingvo Esperanto.

En la lingvo Esperanto estas gramatiko, sed ĝi havas tre simplajn kaj facilajn regulojn. Ili estas:

1. En la esperanta lingvo la **nomoj** havas ĉe fino la literon **o** kaj ni demandas **Kio?** (libro, rozo)
2. La **kvalitoj** havas ĉe fino la literon **a** kaj ni demandas **Kia?** (bona, juna, sana)
3. La **verboj** havas ĉe fino la literojn **as** kaj ni demandas **Kion faras?** (staras, vidas, montras)

Gelernantoj! Ĉu vi scias, kion faras la demandaj vortoj? — Jes... ili demandas.

Kion demandas la vorto **Kiu?**	La vorto **Kiu** damandas personon
„ „ „ „ **Kio?**	„ „ **Kio** „ objekton
„ „ „ „ **Kia?**	„ „ **Kia** „ kvaliton
„ „ „ „ **Kie?**	„ „ **Kie** „ lokon
„ „ „ „ **Kien?**	„ „ **Kien** „ direkton

Ĉu la gramatikaj reguloj estas simplaj kaj facilaj? — Jes... ili estas tre simplaj kaj facilaj.

La instruisto estas feliĉa. Liaj gekursanoj lernas diligente esperantan lingvon kaj ili komprenas bone, kion li parolas al ili. Nun mi preparas al vi novajn demandojn. Ili ne estas malfacilaj. Vi respondas ilin hejme al mi. La demandoj estas:

1. El kiuj personoj konsistas via familio?
2. Ĉu via koro estas forta kaj sana?
3. Ĉu vi ŝatas sporton kaj gimnastikon?
4. Ĉu vi estas bona sportulo (-ino)?

5. Ĉu vi apartenas al sportaj kluboj?
6. Ĉu vi saltas alte?
7. Ĉu vi marŝas rapide?
8. Ĉu via pulso batas forte?
9. Ĉu vi ĵetas ŝtonon malproksime?
10. Ĉu vi estas lerta kaj kapabla en esperanta konversacio?

8. LECIONO OKA

A. GRAMATIKO

Zaimki i przysłówki **pytające** mają początkową literę **K** (ko), **wskazujące** — literę **T** (to), np. **Kiu?** — **Tiu, Kio?** — **Tio, Kia?**— **Tia...**

Partykuła bliskości **ĉi**, dodana do zaimka wskazującego lub przysłówka miejscowego, oznacza bliższą osobę, rzecz lub **miejsce.** Może ona stać przed lub po wyrazie, np.

ĉi tiu	albo:	tiu	ĉi	— ten	tiu	— tamten
ĉi tio	„	tio	ĉi	— to	tio	— tamto
ĉi tie	„	tie	ĉi	— tu	tie	— tam
ĉi tien	„	tien	ĉi	— tutaj	tien	— tam (w tamtym kier.)

Bezokolicznik czasowników kończy się zawsze **na i**, np. **legi** — czytać, **teni** — trzymać, itd.

Tryb rozkazujący kończy się na **u**, np. **legu!** — czytaj! **tenu!** — trzymaj!

B. VORTOJ

Mastro — gospodarz, **gasto** — gość, **afero** — sprawa, **planko** — podłoga, **plafono** — sufit, **estrado** — podium, estrada, **vero** — prawda, **Tadeo** — Tadeusz, **Stefano** — Stefan, **Stanislao** — Stanisław, **Heleno** — Helena, **Sofio** — Zofia, **teksto** — tekst, **odoro** — woń, zapach, **ĝardeno** — ogród, **eraro** — błąd, **pilko** — piłka, **poŝto** — poczta, **operacio** — operacja, **kontrolo** — kontrola, **antaŭurbo** — przedmieście, **milito** — wojna, **lumo** — światło, **dekstra** — prawy, **agrabla** — przyjemny, **luksa** — luksusowy,

wystawny, **lasta** — ostatni, **praktika** — praktyczny, **mizera** — mizerny, **ĉarma** — uroczy, czarowny, **gastama** — gościnny, **jena** — ten oto, następny, **peti** — prosić, **ripeti** — powtarzać, **plaĉi** — podobać się, **vojaĝi** — podróżować, **detranĉi** — odcinać, **veni** — przychodzić, przyjść, **deziri** — życzyć, **adiaŭi** — żegnać, **levi** — podnosić, **porti** — nosić, **pendi** — wisieć, **silenti** — milczeć, **traduki** — tłumaczyć, **forlasi** — zostawiać, opuszczać, **kredi** — wierzyć, **babili** — gadać, gwarzyć, **ofte** — często, **oportune** — wygodnie, **jam** — już, **pri** — o, co dotyczy, **pro** — dla, z powodu, **por** — dla, za, aby, **apud** — obok, przy, **se** — jeżeli, **resti** — zostać, **ok** — osiem.

C. KONVERSACIAJ EKZERCOJ

La kapo de la demandaj vortoj estas la litero **K** (ko). El la demandaj vortoj ni faras facile novajn vortojn. Rigardu! Rigardu! Mi skribas sur la tabulo la demandajn vortojn. Ĉu vi vidas ilin? Ĉu vi havas bonajn okulojn? Jes! Bone! Vi scias jam, kion ili demandas. Nun mi faras malgrandan operacion, ne per la tranĉilo, sed per la kreto. Mi detranĉas de la vortoj la kapon **K**. Restas nun la vortoj sen kapo. Sed mi havas bonan koron — mi estas bonkora — kaj mi donas al ili novan kapon. La nova kapo de la vortoj estas la litero **T** (to). La novaj vortoj ne estas jam demandaj vortoj, sed ili estas la **montraj** vortoj.

Kion faras la montraj vortoj? — La montraj vortoj montras.

Kion montras la vorto **Tiu**? — La vorto **Tiu** montras personon.

Ĉu la vorto **Tio** montras personon? — Ne, la vorto **Tio** ne montras personon, sed ĝi montras objekton.

Kion montras la vorto **Tia**? — La vorto **Tia** montras kvaliton.

Kion montras la vorto **Tie**? — La vorto **Tie** montras lokon.

Kion montras la vorto **Tien**? — La vorto **Tien** montras direkton.

La montraj vortoj montras proksimajn kaj malproksimajn personojn, objektojn aŭ lokojn.

Ĉi tiu lernanto sidas en la unua benko kaj **tiu** en la lasta. **Tiu ĉi** libro apartenas al mi — **tiu** al la fraŭlino W. **Ĉi tio** estas blanka kaj **tio** estas nigra. **Ĉi tie** staras la tablo kaj **tie** pendas la lampo. Venu al mi **tien ĉi!** Iru de mi **tien** al la pordo! Mi petas vin, gelernantoj, ripetu montrajn vortojn! La montraj vortoj estas jenaj: tiu, tio, tia, tie, tien.

Ĉu la novaj vortoj plaĉas al vi? Ĉu ili ne estas praktikaj?

Jes! La novaj vortoj plaĉas al ni kaj ili estas tre praktikaj.

La ĉambroklaso konsistas el kvar muroj, el unu planko kaj unu plafono. De la plafono pendas la moderna lampo. La elektra lumo de la lampo estas ofte tre forta. Estas agrable labori ĉe la bona lumo. La malriĉaj homoj, laboristoj, kiuj loĝas en antaŭurbo, havas ofte tre mizeran lumon en siaj hejmoj.

Svedujo estas tre bela kaj ĉarma lando. Tie estas multaj belaj urboj. La Svedoj loĝas en siaj hejmoj tre oportune kaj komforte. Iliaj hejmoj konsistas el helaj kaj puraj ĉambroj — en ili estas multekostaj mebloj kaj luksaj objektoj. Polujo estas bela kaj riĉa lando, sed ni ne estas riĉaj pro la lasta granda milito.

La sinjoro de la hejmo estas la mastro. La sinjorino estas mastrino. En nian hejmon venas nova homo. Li ne estas mastro, sed li estas gasto. Ni Poloj tre ŝatas gastojn — ni estas gastamaj. Gelernantoj! Faru kontrolon, ĉu vi estas gastamaj.

Sed estas gastoj, kiuj vizitas nin ofte kaj ili havas grandan apetiton. Ĉu vi komprenas? Ili multe parolas pri diversaj aferoj kaj ni ne ŝatas ilin. Ci tiuj homoj ne havas tempon por labori, nur tempon por babili. Se ni havas tempon (kaj monon!), ni vizitas volonte teatron, kinejon aŭ muzikejon. Tre agrable estas aŭskulti belajn koncertojn en muziksalonoj.

La lernanto N. portas kun si sian lernolibron kaj ŝian kajeron. En la kajero estas multaj esperantaj vortoj. Nun li rigardas la instruiston. En la dekstra mano la instruisto tenas la kreton, en la maldekstra la spongon. Li levas la dekstran manon kaj skribas sur la tabulo novajn demandojn por siaj gekursanoj.

La demandoj por hejma laboro estas:

1. Kio staras sur la estrado en la ĉambroklaso?
2. Ĉu la nomoj Tadeo, Stefano, Stanislao, Heleno, Sofio estas ordinaraj nomoj?
3. Ĉu vi havas ĝardenon apud via domo?
4. Kia estas la odoro de la rozoj?
5. Ĉu estas facile traduki esperantajn tekstojn?
6. Ĉu vi havas multajn erarojn en viaj domaj ekzercoj?
7. Ĉu vi ŝatas pilkludi?
8. Ĉu en nia urbo estas granda poŝtoficejo?
9. Ĉu vi deziras vojaĝi al malproksimaj landoj?
10. Ĉu vi ŝatas silenti aŭ babili?

Nun mi adiaŭas vin, karaj gekursanoj, kaj mi deziras al vi „Bonan nokton"! Ĝis la revido!

Nun ni forlasu nian kursejon kaj rapidu hejmen!

9. LECIONO NAŬA

A. GRAMATIKO

Czas przeszły czasowników na wszystkie osoby i liczby ma końcówkę **is**, np. mi leg**is** — czytałem (-am).

Czas przyszły ma końcówkę **os**, np. ŝi leg**os** — będzie czytała, czytać będzie.

Stopień wyższy przymiotnika i przysłówka tworzy się przy pomocy wyrazu **pli** — więcej i **malpli** — mniej. Wyrażenie polskie **niż, aniżeli** tłumaczy się przez **ol**, np. Mia patrino estas **pli** bona **ol** mia patro — moja matka jest lepsza od mego ojca (niż mój ojciec), albo: Mia patro estas **malpli** bona **ol** mia patrino — mniej dobry... Li skribas **pli** bele **ol** mi — on pisze ładniej aniżeli ja, albo: Mi skribas **malpli** bele **ol** li — mniej ładnie niż ja.

Stopień najwyższy przybiera wyrażenie **plej** — najwięcej i **malplej** — najmniej. Wyrażenie porównawcze **z, ze** — tłumaczy się przez **el**, np. El la tri krajonoj la flava krajono estas la plej longa — z trzech ołówków żółty ołówek jest najdłuższy.

Przyrostek **ig** oznacza robić coś czymś, skłaniać coś do czegoś, nadawać czemuś jakąś cechę, np. **faciligi** — ułatwiać, **sanigi** — leczyć, **kunigi** — łączyć, **unuigi** — jednoczyć, **aligi** — przyłączyć, **varmigi** — ogrzewać, **lumigi** — oświetlać itd.

Zaimek zwrotny na 3-cią osobę jest **si** (biernik: **sin**), np. **lavi sin** — myć się.

Odmiana czasownika zwrotnego

Liczba pojedyncza:

1. mi lavas min — myję się
2. vi „ vin — myjesz się
   li „ **sin** — myje się
3. ŝi „ **sin** — „ „
   ĝi „ **sin** — „ „

Liczba mnoga:

1. ni lavas nin — myjemy się
2. vi „ vin — myjecie się
3. ili „ **sin** — myją się

B. VORTOJ

Forno — piec, **fajro** — ogień, **vetero** — stan pogody, pogoda, **horloĝo** — zegar, **kalendaro** — kalendarz, **lundo** — poniedziałek, **mardo** — wtorek, **merkredo** — środa, **ĵaŭdo** — czwartek, **vendredo** — piątek, **sabato** — sobota, **dimanĉo** — niedziela, **parko** — park, **arbo** — drzewo, **kombilo** — grzebień, **preĝejo** — kościół, **okupo** — zajęcie, **kuracisto, sanigisto** — lekarz, **akvujo** — zbiornik do wody, **pelvo** — miednica, **polvo** — kurz, pył, **vojo** — droga, **ilustrita** — ilustrowany, **tuttaga** — całodzienny, **botanika** — botaniczny, **danĝera** — niebezpieczny, **lavi** — myć, **kombi** — czesać, **vesti** — ubierać, **preĝi** — modlić się, **matenmanĝi** — jeść śniadanie, **ripozi** — odpocząć, wypocząć, **promeni** — spacerować, **dikti** — dyktować, **alporti** — przynieść, **rakonti** — opowiadać, **renkonti** — spotkać, **hodiaŭ** — dzisiaj, **hieraŭ** — wczoraj, **morgaŭ** — jutro, **tuj** — natychmiast, zaraz, **poste** — potem, później, **certe** — na pewno, pewnie, **frumatene** — wcześnie rano,

sufiĉe — dosyć, dość, **post** — po, **dum** — podczas, **kune kun** — wraz z, **naŭ** — dziewięć, **t. e.** (tio estas) — tj. (to jest), **survoje** — na drodze, **eble** — może.

C. KONVERSACIAJ EKZERCOJ

Antaŭ kelkaj tagoj mi skribis sur la tabulo la frazon: „Per la spongo ni faras la tabulon pura". La frazo ne plaĉas al mi. Hodiaŭ mi skribos al vi pli belan frazon. Rigardu! Rigardu! Mi skribas la frazon: „Per la spongo ni purigas la tabulon". Vi vidas, ke la nova frazo estas pli bela kaj pli praktika ol la antaŭa frazo. Ĉu ne?

En angulo de la ĉambro staras apud la muro unu objekto. Rigardu ĝin! Ĝi ne estas meblo, sed ĝi estas tre grava objekto. En ĝi estis kaj estos la fajro, ruĝa kaj tre varma objekto. La forno varmigas la ĉambron. Lampo ne varmigas ĉambron, sed ĝi lumigas ĉambron.

La hodiaŭa mateno estis tre bela kaj varma, sed ĉu la morgaŭa tago estos bela — ni ne scias certe. Hodiaŭ ni havas multe por labori (multan laboron). Hieraŭ kaj antaŭhieraŭ ni havis interesajn lecionojn, sed morgaŭ ni ne laboros, nur ripozos. Morgaŭ estos dimanĉo. En ĉi tiu tago ni ne laboras en la lernejo, sed ni iras matene kune kun niaj instruistoj en la preĝejon.

Hodiaŭ mi montros al vi novan objekton — ĝia nomo estas kalendaro. La kalendaro montras al ni tagojn. En ĝi estas nigraj kaj ruĝaj tagoj. Gelernantoj tre ŝatas ruĝajn tagojn. Vi certe ankaŭ ŝatas ilin! Ĉu ne? Tagoj havas nomojn. La nomoj de la tagoj estas: lundo, mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo, sabato kaj dimanĉo. Hodiaŭ estas sabato, hieraŭ estis vendredo kaj morgaŭ estos dimanĉo. Se la vetero estos bela, ni iros kune kun niaj geamikoj en la „Botanikan Ĝardenon". Tie estas tre bele — estas multaj interesaj floroj kaj arboj. Ni tre volonte promenas inter la floroj, kiuj havas tre agrablan odoron. En aliaj urbparkoj estas multaj benkoj aŭ seĝoj kaj homoj volonte ripozas post longa promeno. Aliuloj ŝatas legi librojn, gazetojn aŭ ilustritajn ĵurnalojn.

Nun mi rakontos al vi, gekursanoj, kion mi faras hejme en la mateno. Nokte mi dormas bone post tuttaga laboro. Frumatene mi malfermas okulojn, rigardas mian poŝhorloĝon, kiu kuŝas sur la nokta tableto (stoliczek) apud mia lito kaj kiu montras jam la malfruan tempon, kaj mi levas min el la lito tre rapide. Mi iras tuj al la pelvo (lavtablo — umywalka) kaj mi lavas min en malvarma, ofte en la varma akvo. Poste mi iras al la spegulo kaj mi kombas min per la kombilo. Mi prenas sur min mian ordinaran veston (laborveston) — dimanĉe mi vestas min alie — kaj fine mi matenmanĝas. Tuj post la matenmanĝo mi forlasas mian loĝejon kaj iras al la laboro en gimnazion. Survoje mi renkontas ofte miajn kolegojn, kiuj ankaŭ rapidas al diversaj okupoj. Ne estas nun tempo por rakonti al vi, kion mi faras poste dum la tuta tago, sed mi rakontos eble al vi ĉi tion post kelkaj tagoj.

Gekursanoj! Aŭdu! Aŭdu! Rigardu min! Mi havas en la dekstra mano du objektojn, t. e. du krajonojn. La flava krajono estas pli longa ol la ruĝa. Nun mi havas tri krajonojn: la unua krajono estas longa, la dua krajono estas pli longa, la tria krajono estas plej longa. El la tri krajonoj la plej longa estas la flava krajono. Mi skribas bele, li skribas pli bele ol mi, kaj ŝi skribas plej bele el ni.

Mia poŝhorloĝo montras, ke estas jam tempo fini la naŭan lecionon. Mi finas ĝin kaj mi diktos nun al vi miajn kutimajn ekzercajn demandojn por via hejma laboro. Respondu ilin bone, senerare kaj alportu viajn ekzercojn por plej proksima konversacio.

EKZERCAJ DEMANDOJ:

1. Ĉu en via hejmo estas nur unu forno?
2. Kion faras la fornoj?
3. Ĉu vi ŝatas promeni sola?
4. Ĉu vi ofte purigas vian veston?
5. Kiu kuracas (sanigas) gemalsanulojn?
6. En kiu tago homoj ne laboras, sed ripozas?

7. Ĉu en nunaj tempoj estas senlaboruloj?
8. Ĉu malsana homo estas gaja kaj feliĉa?
9. Ĉu vi levas vin el la lito frumatene?
10. Ĉu polvo estas danĝera por nia sano?

10. LECIONO DEKA

A. GRAMATIKO

Znając w języku Esperanto jeden pierwiastek, możemy tworzyć różnorodne wyrazy, bądź to przez zmianę końcówek (**o**, **a**, **i**, **e**), bądź to przez dodanie różnych przedrostków lub przyrostków, np. telefon**o**, telefon**a**, telefon**i**, telefon**e** (telefonicznie); san**a**, **mal**san**a**, malsan-ul-ej-o — lecznica, szpital itd.

Po spójniku **por** i **anstataŭ** — kładzie się zwykle **tryb bezokoliczny**, np. li eliris **por** renkonti lin — wyszedł, aby go spotkać; **anstataŭ** paroli pli bone fari — zamiast mówić lepiej czynić.

Po spójniku **por ke** (aby, żeby) kładzie się zawsze **tryb rozkazujący**, np. la patro skribis **por ke** vi mem legu — ...abyś sam czytał; la intruisto postulis, **ke** vi lernu — ...żądał, żebyś się uczył; ni lernas **por ke** ni fariĝu saĝaj (albo: por fariĝi saĝaj) — uczymy się, żeby zmądrzeć (dosłownie: abyśmy się stali mądrymi).

Tryb rozkazujący kładzie się w zdaniach wyrażających:

a) **rozkaz**, np. diru al li, ke li mem skribu — ...aby sam pisał;
b) **życzenie**, np. mi deziras, ke li venu al mi — życzę sobie, aby on przyszedł do mnie;
c) **cel**, np. estas necese, ke li sciiĝu pri ĉi tio — jest rzeczą konieczną, aby on dowiedział się o tym.

Przedrostek **re** oznacza zwrot, powrót lub powtórzenie czynności, np. **re**veni — powrócić, **re**doni — oddać, zwrócić; **re**novigi — odnowić itd.

Przedrostek **ek** oznacza początek lub krótkotrwałość czynności, np. **ek**kanti — zaśpiewać, **ek**vidi — zobaczyć, **ek**dormi — zasnąć.

Przyrostek **iĝ** oznacza — stać się czymś (sam z siebie), np. **kuniĝi** — łączyć się, **unuiĝi** — jednoczyć się, **aliĝi** — przyłączyć się.

B. VORTOJ

Historio — historia, **vivo** — życie, **korto** — podwórze, **invito** — zaproszenie, **supo** — zupa, **viando** — mięso, **legomo** — jarzyna, **fiŝo** — ryba, **fasto** — post, **festo** — święto, **frukto** — owoc, **pano** — chleb, **butero** — masło, **leterportisto** — listonosz, **salajro** — stała płaca, pensja, **ludilo** — zabawka, **aĝo** — wiek (życia), **tasko** — zadanie, praca, pensum szkolne, **skandalo** — zdarzenie gorszące, awantura, **vasta** — obszerny, rozległy, **kontenta** — zadowolony, **ĉefa** — główny, **sata** — syty, **laca** — znużony, zmęczony, **saĝa** — mądry, **necesa** — konieczny, niezbędny, **reveni** — powracać, **viziti** — odwiedzać, **minaci** — grozić, **ricevi** — otrzymać, **tagmanĝi** — jeść obiad, **vespermanĝi** — jeść kolację, **konsenti** — zgadzać się, **tranokti** — przenocować, **ripozi** — odpocząć, wypocząć, **ripari** — naprawiać, **renkontiĝi** — spotkać się z kim, **enlitiĝi** — kłaść się do łóżka, **sonĝi** — śnić, **dek** — dziesięć, **precipe** — szczególnie, głównie, **tagmeze** — w południe, **nuntempe** — w chwili obecnej, **tamen** — jednak, jednakże, **plu** — dalej, dłużej, **plue** — w dalszym ciągu, **baldaŭ** — wkrótce, wnet, **kvankam** — chociaż, **eĉ** — nawet, **kial?** — dlaczego?, **tial** — dlatego, **ĉar** — ponieważ.

C. KONVERSACIAJ EKZERCOJ

Antaŭhieraŭ mi mem skribis la lernejan ekzercon kaj ĝi estis bona, eĉ pli bona ol la via. En la skriba ekzerco vi faris la saman eraron, kiun mi, kvankam vi ne sidis proksime al mi, sed malproksime de mi.

La plej bona amiko de mia patro revenis el sia longa vojaĝo kaj vizitis nin antaŭ kelkaj tagoj. Li rakontis al ni interesan historion el sia vojaĝo, kiun mi aŭskultis kun vera atento. Al lia vivo minacis granda danĝero, tamen li revenis feliĉe hejmen. En nia familio ni estas tri gefratoj. Mi ricevis de li tre

belan kaj dikan libron kun multaj bildoj. Mia frato ne ricevis libron, sed grandan pilkon, kiun li ludas kun siaj kolegoj sur la korto de nia domo. Al mia fratino li donis ankaŭ libron, sed ŝi ne estis tute kontenta, ĉar ŝi pli ŝatas sporton kaj diversajn pilkludojn ol librojn. Miaj gepatroj petis lin, ke li restu ĉe ni pli longe kaj vespermanĝu kune kun ni. Li volonte konsentis ĉi tiun inviton kaj ni gastigis lin ĝis malfrua vespero. Ĉar estis jam tre malfrue, li tranoktis ĉe ni. Matene li adiaŭis nin kaj forlasis nian hejmon por viziti aliajn kolegojn en nia urbo. Ĉar dum lia vizito mi ne preparis min bone por la lernejo, precipe el matematiko, mi estis tie tre malfeliĉa. Dum la paŭzoj inter la lecionoj mi ne ripozis kaj ne babilis kun miaj kolegoj sur la vasta korto de nia lernejo, sed mi ripetis en ĉi tiu tempo mian plej malfacilan lernobjekton, ĉar mi ne deziris esti „la lasta" en la klaso.

Mia tuta familio, kiu konsistas el kvin personoj, ne estas riĉa. Mia patro estas la oficisto kaj laboras en la ĉefpoŝtoficejo. Li ne estas leterportisto, sed oficisto, tamen li ne ricevas sufiĉan monon (salajron). Tagmeze ni renkontiĝas ĉe la tablo kaj ni kune tagmanĝas kun granda apetito. La hodiaŭa tagmanĝo konsistis el supo kaj viando kun legomo. Hieraŭ ni havis fiŝon, ĉar vendrede estis fastotago. En la festotagoj nia patrino preparas al ni pli bonan tagmanĝon, sed ŝi mem ne havas apetiton, ĉar ŝi multe laboras hejme kaj ne estas tute sana. Fruktojn ni tre ŝatas kaj nuntempe ni manĝis ilin sufiĉe, ĉar ili estis malkaraj. Sed dum la lasta milito ni tute ne manĝis fruktojn — ili estis „nur por Germanoj". Por la vespermanĝo ni ricevas de la patrino varman supon aŭ kafon kun pano. Buterpanon ni manĝas ankaŭ nuntempe tre malofte, ĉar ĝi estas multekosta. Ni estas ofte tre malsataj kaj ni manĝas ordinarajn manĝobjektojn kun granda apetito. Post la vespermanĝo ni laboras plue dum kelka tempo. La patrino riparas niajn malnovajn vestojn kaj la patro legas gazetojn kun plej novaj skandaloj. Miaj gefratoj ne ludas plu per ludiloj (ĉi tion faras nur malgrandaj infanoj), sed ili pilkludas. Mi,

la plejaĝa, legas librojn aŭ mi preparas miajn hejmajn taskojn por la morgaŭa tago. Post kelka tempo mi estas tre laca kaj mi iras en la liton. Mi enlitiĝas kaj baldaŭ mi ekdormas. Dum la dormo mi vidas ofte belajn bildojn — mi sonĝas bele pri diversaj aferoj kaj personoj.

EKZERCAJ DEMANDOJ:

1. Kial vi ne manĝas ofte buterpanon?
2. Ĉu vi bone dormas dum la nokto?
3. Pri kiu aŭ pri kio vi sonĝas plej ofte?
4. Kial vi ne vizitas ofte lumbildteatron?
5. Ĉu matematiko estas facila lernobjekto por vi?
6. Kia lingvo estas Esperanto?
7. Ĉu via patro ricevas altan salajron?
8. Kiu el viaj gefratoj estas la plejaĝa?
9. Kion vi faras dimanĉe posttagmeze?
10. Ĉu leterportisto alportas ofte leterojn al vi?

11. LECIONO DEKUNUA

A. GRAMATIKO

Zaimka osobowego **oni** używa się na liczbę mnogą, gdy podmiotem czynności jest jakaś nieokreślona osoba, np. **oni** diras — mówią, mówi się; **oni** skribas — piszą, pisze się; **oni** manĝas — jedzą, je się.

Dalsze przysłówki pytające i wskazujące:

KIAL? — dlaczego?	TIAL — dlatego
KIEL? — jak?	TIEL — tak

Przyrostek **et** pomniejsza dane pojęcie, np. tableto — stolik, **beleta** — ładniutki, **ploreti** — kwilić, popłakiwać.

Przyrostek **eg** zwiększa lub wzmacnia dane pojęcie, np. domego — gmach, **belega** — przepiękny, **ploregi** — zanosić się od płaczu.

Przyrostek **ad** oznacza częstotliwość lub trwanie czynności, np. esti — być, estadi — bywać, resti — zostać, restadi — pozostawać, przebywać, lernado — uczenie się.

Przyrostek **ec** oznacza przymiot w znaczeniu oderwanym, np. beleco — piękność, boneco — dobroć, infaneco — dzieciństwo.

B. VORTOJ

Kaŭzo — przyczyna, **maniero** — sposób, **fabrikanto** — fabrykant, **sufikso** — przyrostek, **prefikso** — przedrostek, **poto** — garnek, **eksterlando** — zagranica, **Svisujo** — Szwajcaria, **finaĵo** — końcówka, **samlandano** — rodak, **alilandano, fremdlandano** — obcokrajowiec, **kunulo** — towarzysz, **edzo** — mąż, **okupado** — okupacja, **banko** — bank, **elementa** — elementarny, **soifa** — spragniony, **kruela** — okrutny, **fremda** — obcy, **simpatia** — sympatyczny, miły, **koni** — znać, **plori** — płakać, **ridi** — śmiać się, **pligrandigi** — powiększać, **malgrandigi** — pomniejszać, **uzi** — używać, **korespondi** — korespondować, **sendi** — posyłać, **farti** — mieć się, **mortigi** — zabić, zamordować, **voli** — chcieć, **devi** — musieć, **povi** — móc, **perdi** — gubić, tracić, **resti** — pozostać, **helpi** — pomagać, **interesiĝi** — interesować się, **fariĝi** — stawać się, **komenci** — zaczynać, **perfektiĝi** — doskonalić się, **antaŭnelonge** — niedawno, **reciproke** — wzajemnie, **samtempe** — jednocześnie, zarazem, **kontraŭe** — przeciwnie, **nek... nek...** — ani... ani..., **pro tio (tial)** — dlatego, **ekzemple (ekz.)** — na przykład (np.).

C. KONVERSACIAJ EKZERCOJ

Dum la lasta leciono ni ekkonis novan demandan vorton: ĉi tio estis la vorto **KIAL?** kaj la montra vorto **TIAL.** La finaĵo de la vortoj signifas nek personon, objekton, nek kvaliton, lokon aŭ direkton, sed kaŭzon, ekzemple: La malgranda infano ploras. Ni demandas: Kial ploras la infano? La respondo estas: La infano ploras, ĉar ĝi estas malsata.

La plua demanda vorto estas **KIEL?** La vorto demandas manieron, la vorto **TIEL** montras manieron.

Ĉu vi komprenas la novajn vortojn?

Jes, ni komprenas...

Kiel vi fartas, gelernantoj?

Dankon! Ni fartas bone.

Kiel plaĉas al vi la novaj vortoj?

Al ni tre plaĉas la novaj vortoj.

Jes, ili estas vere simplaj kaj praktikaj. La angla kaj franca lingvoj ne estas **tiel** facilaj **kiel** Esperanto kun tre simplaj gramatikaj reguloj. Kaj vi, gelernantoj (-inoj), tre ŝatas simplajn kaj facilajn regulojn. Ĉu ne?

Gekursanoj, mi petas vin, diru al mi, **kiel** vi sentas vin post tuttaga laboro.

Post tuttaga laboro ni sentas nin **tiel** lacaj, ke ni tuj enlitiĝas.

Kiel vi laboras dum la tuta tago?

Ni laboras dum la tuta tago tre rapide kaj pro tio (tial) ni ankaŭ rapide laciĝas.

Oni diras, ke esperantistoj estas fabrikantoj de novaj esperantaj vortoj — ili fabrikas multajn belajn kaj praktikajn vortojn. En la kurso ni ankaŭ formas el malnovaj vortoj novajn vortojn. Rigardu! Rigardu! La sufikso **et** malgrandigas la vorton kaj la sufikso **eg** pligrandigas ĝin. Ekz.: malgranda tablo estas tableto, malgranda mano de infano estas maneto. Kaj kontraŭe: tre granda tablo estas tablego, tre granda domo estas domego.

Se ni estas tre soifaj, ni ne trinkas la akvon el malgranda taso, sed el pli granda poteto. La beleta infaneto ploretis kaj post nelonga tempo ĝi ree ridetis al sia patrineto.

Lernantinoj kaj lernantoj! Mi petas vin, fabriku novajn vortojn kaj uzu ilin en konversacio. Vi bone scias, ke legi kaj skribi esperante estas facile, paroli tamen estas malpli facile. Tial (pro tio) parolu kaj parolu tre ofte — hejme kaj en la lernejo kaj faru gravan praktikon!

Ĉu vi scias, kion mi ricevis antaŭnelonge?

Ne, ni ne scias...

Mi diros al vi, ĉar mi ne havas sekretojn antaŭ vi. Mi ricevis unu tre agrablan leteron el eksterlando de mia esperanta kore-

spondamiko sinjoro JAYET el Morges. Ĉi tiu urbo ne estas en Svedujo, sed en Svisujo, tre ĉarma kaj belega lando. Antaŭ milito mi korespondis kun li kaj lia edzino dum ok jaroj kaj mi ricevis de ili multajn belajn albumojn, bildkartojn kaj leterojn. Nun li sendis al mi denove leteron, en kiu li demandas min, kiel mi fartas kaj kiel fartas mia tuta familio. Li aŭdis multe kiel kruele la Germanoj turmentis kaj mortigis niajn samlandanojn dum ilia okupado kaj li volas scii, kiel ni sentas nin post tiel kruela milito. Kvankam lia feliĉa lando ne partoprenis en la lasta milito, tamen li perdis sian plej bonan kaj karan edzinon, veran vivkunulinon. Li restis nun sola kun siaj filinoj. Li estis bona edzo kaj patro kaj li estas samtempe tre bona kaj bonkora esperantisto, kiu helpis mian familion dum la tuta germana okupado. Li sendadis per bankoj monon al mi kaj sendadis mallongajn leterojn, ne en esperanta, sed en germana lingvo. Nun ni povas denove korespondi en nia kara lingvo Esperanto. Li tre interesiĝas pri mi kaj mia familio kaj reciproke mi ankaŭ interesas min pri lia vivo. Ni estas por ni bonaj kaj fidelaj amikoj. Mi nomis lin dum militaj jaroj „onklo" kaj li restis por ni kaj restos karega onklo.

En baldaŭa tempo vi fariĝos ankaŭ esperantistoj (-inoj) kaj post la fino de ĉi tiu elementa kurso vi ankaŭ komencos korespondi kun fremdlandanoj (-inoj). Ĉi tio estas tre granda plezuro — havi amikojn en la tuta mondo kaj ricevi de ili de tempo al tempo agrablajn leterojn kun simpatiaj vortoj. Vi korespondos kun alilandanoj pri diversaj temoj, sed antaŭe vi devas perfektiĝi en nia bela lingvo. Vi devas diligente lerni kaj ofte uzi ĝin en la konversacio.

Respondu skribe la demandojn!

1. Kiel vi fartas?
2. Nomu la ĉefurbon de Francujo!
3. Kion faras la prefikso **et** kaj kion la prefikso **eg**?
4. Kiel ni sentis nin sub la germana okupado?
5. Kiel turmentis la Germanoj niajn samlandanojn?

6. Per kio ni perfektiĝas en la esperanta lingvo?
7. Ĉu vi volas korespondi kun eksterlandanoj?
8. Ĉu via infaneco estis feliĉa?
9. Kial vi ne povas nun vojaĝi al malproksimaj landoj?
10. Ĉu la fideleco de via amiko estas granda?

12. LECIONO DEKDUA

A. GRAMATIKO

Liczebniki główne (nieodmienne) są następujące: 0 — nulo, unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek, dek unu, dek du...

Dziesiątki i setki tworzą się przez proste łączenie odpowiednich liczebników, np. 27 — dudek sep, 114 — cent dek kvar, 1946 — mil naŭcent kvardek ses.

Liczebniki porządkowe otrzymują końcówkę przymiotnikową **a**, np. unua — pierwszy, dekdua — dwunasty, centtrideksepa — sto trzydziesty siódmy.

Liczebniki rzeczownikowe przybierają końcówkę rzeczownikową **o**, np. unuo — jednostka, jedynka, duo — dwójka, dekduo — tuzin, dwunastka, sesdeko — kopa, sześćdziesiątka.

Liczebniki przysłówkowe przybierają końcówkę przysłówka **e**, np. unue — po pierwsze, due — po drugie, trie — po trzecie itd.

Przyimka **da** używa się na oznaczenie ilości (**kiom da?** — ile czegoś). Stawia się go nie po liczebnikach głównych, lecz rzeczownikowych w miejsce dopełniacza, np. dek du plumoj, ale: dekduo da plumoj; cent libroj, ale: cento da libroj (setka czego?);

glaso **da** akvo — szklanka wody
glaso **de** akvo — szklanka od wody (bez wody)

Mi vidis kelkajn homojn, ale: mi vidis kelke da homoj.

Kiom **da** jaroj vi havas? Mi havas dek ses jarojn.

Kiomjara aŭ kiomaĝa vi estas? Mi estas dekok-jara (-jaraĝa). Kioma? — który (pod względem ilości), np. Kioma horo? — która godzina?

Dato: Krakovo, la 26-an de Majo (de la jaro) 1946 (-a).

Przyrostek **ar** oznacza zbiór danych przedmiotów, np. **arbaro** — las, **vortaro** — słownik, **vagonaro** — pociąg, **ŝtupo** — stopień, **ŝtuparo** — schody, **ŝtupeto** — szczebel, **ŝtupetaro** — drabina.

Przyrostek **aĵ** oznacza przedmiot posiadający pewną właściwość lub zrobiony z pewnego materiału, ewentualnie objaw uczucia dostrzegalny zmysłami, np. **mangaĵo** — potrawa, jedzenie, (ale: **manĝado** — jedzenie jako czynność), **verdaĵo** — zieleń, **amikaĵo** — czyn przyjacielski, **muzikaĵo** — utwór muzyczny.

Przyimek **je** nie ma określonego znaczenia i używamy go wtedy, gdy żaden inny nie odpowiada sensowi zdania, np. **je** kioma horo? — o której godzinie? **je** la sepa horo — o siódmej godzinie. Zamiast przyimka **je** używa się często biernika. Formę zdania „ĉu vi ne kompatas je maljuna homo?" lepiej wyrazić biernikiem: „ĉu vi ne kompatas maljunan homon? Forma pierwsza wychodzi już z użycia.

B. VORTOJ

Cifero — cyfra, **nombro** — liczba, ilość, **folio** — liść, karta, arkusz, **paĝo** — stronica, **paŝo** — krok, **monato** — miesiąc, **jaro** — rok, **semajno** — tydzień, **Januaro** — styczeń, **Februaro** — luty, **Marto** — marzec, **Aprilo** — kwiecień, **Majo** — maj, **Junio** — czerwiec, **Julio** — lipiec, **Aŭgusto** — sierpień, **Septembro** — wrzesień, **Oktobro** — październik, **Novembro** — listopad, **Decembro** — grudzień, **fervojo** — droga żelazna, kolej, **vagonaro** — pociąg, **aŭtobuso** — autobus, **ŝipo** — okręt, statek, **vaporo** — para (wodna), **homaro** — ludzkość, **manĝaĵo** — jadło, potrawa, **dolĉaĵo** — rzecz słodka, **sukeraĵo** — cukierek, słodycz, **dekjaro** — dziesięciolecie, **centjaro** — stulecie, **miljaro** — tysiąclecie, **plentago, noktotago** — doba, **horo** — godzina, **minuto** — minuta, **miliardo** — miliard, **materialo** — materiał, **sekundo** — sekunda, **dato** — data, **dialekto** — dialekt, narzecze, **plena** — pełny, **uzata** — używany, **kalkuli** — liczyć, rachować, **pasi** — mijać, przechodzić, **rekomendi** — polecać, **memori** — pamiętać,

forgesi — zapominać, **pardoni** — przebaczać, **pardonu!** — przepraszam! **sciiĝi** — dowiedzieć się, **tra** — przez, **kiom?** — ile? **do** — więc, przeto.

C. KONVERSACIAJ EKZERCOJ

Gekursanoj! Hodiaŭ ni komencos interesan lecionon. Rigardu! Rigardu! Sur la tabulo mi skribas 3, sed ĉi tio ne estas vorto, nur cifero. Ciferoj signifas nombron. Vi konas jam kelkajn ciferojn de unu ĝis dek. Pluaj ciferoj estas: cent, mil, miliono kaj miliardo. Nun mi petas vin, gekursanoj, kalkulu de dek unu ĝis cent! Dek unu, dek du, dek tri... dudek, dudek unu, dudek du... tridek... kvardek... kvindek... sesdek... sepdek... okdek... naŭdek... cent. Ni ne havas tempon por multe kalkuli dum niaj konversacioj. Tial mi rekomendas al vi bonan manieron fari hejme la praktikon. Tie vi havas certe unu dikan libron. Libroj konsistas el folioj. Unu folio havas du paĝojn. Prenu do la dikan libron kaj kalkulu foliojn en ĝi! Se vi ne havas dikan libron, vi havas certe sanajn piedojn. Iru de la lernejo al la domo (hejmo) tra la longaj stratoj kaj kalkulu paŝojn. Iru perpiede! La tempo tre rapide pasas kaj vi sciiĝos kiom da paŝoj vi faris de la lernejo ĝis via hejmo. Se vi ne volas promeni, sidiĝu sur la seĝon, prenu el la poŝo aŭ el la manpoŝo la monon kaj kalkulu dum la tuta vespero: unu, du, tri... kaj vi sentos vin riĉa!

Vi vidis jam kalendaron kun nigraj kaj ruĝaj tagoj. Kalendaro konsistas el dek du (12) partoj — ili estas monatoj. La nomoj de la apartaj monatoj estas: Januaro, Februaro, Marto, Aprilo, Majo, Junio, Julio, Aŭgusto, Septembro, Oktobro, Novembro, Decembro. Dek du monatoj formas unu jaron. Sep tagoj formas unu semajnon. Unu jaro havas 365 (366) tagojn, aŭ 52 semajnojn, aŭ 12 monatojn. La semajno konsistas el 7 tagoj. La monatoj ne estas egalaj. Februaro estas la plej mallonga monato de la jaro. Ĝi havas 28 aŭ 29 tagojn. Aliaj monatoj havas po 30 aŭ po 31 tagoj. Decembro estas la dekdua kaj lasta monato kaj Novembro la antaŭlasta. Dek jaroj formas dekjaron, cent

jaroj — centjaron, mil jaroj — miljaron. Unu plentago (noktotago) havas 24 horojn kaj unu tago 12 horojn. Unu horo konsistas el 60 minutoj, unu minuto el 60 sekundoj.

Ĉu Esperanto estas utila lingvo?

Jes, Esperanto estas tre utila lingvo, ĉar unue — ĝi estas la plej facila lingvo kaj due — ĝi estas la mondlingvo.

Ĉu vi scias, kiom da lingvoj estas en la tuta mondo?

Ne, ni ne scias.

Mi diros al vi! En la tuta mondo estas 2.798 uzataj lingvoj, el ĉi tiu nombro en Eŭropo (sen Rusujo) 36. En Hindujo — 222, sen dialektoj. La nombron de neuzataj lingvoj oni kalkulas je 4.000.

Ĉu vi havas en la kapo, t. e. ĉu vi memoras nomojn de la tagoj? Ĉu vi ne forgesis ilin?

Ne, ni ne forgesis ilin!

Mi ne kredas. Pardonu al mi, gekursanoj, sed mi faros kontrolon. Mi petas vin — nomu precize tagojn de la semajno!

Tagoj de la semajno estas: lundo, mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo, sabato kaj dimanĉo.

Ĉu vi ŝatas vojaĝi tra la tuta Polujo?

Jes, ni ŝatas vojaĝi per vagonaro, t. e. fervoje, per aŭtobuso, per vaporŝipo aŭ eĉ perpiede.

Ĉu vi komprenas novan sufikson **ar**?

Jes, ni komprenas — la sufikso **ar** signifas „multan nombron", ekz.

multaj homoj formas — homaron,
multaj arboj formas — arbaron,
multaj vortoj formas — vortaron,
multaj libroj formas — libraron.

Kion signifas la vorto „gejunularo"? Ĉu vi komprenas gin? Klarigu!

La tempo tiel rapide pasas, ke ni ne povas tralabori la tutan lingvomaterialon. Skribu do tre gravan frazon en viajn kajerojn: „Se vi volas perfektiĝi en la esperanta lingvo, vi devas diligente labori hejme kaj fari la praktikon". Skribu ankaŭ:

DEMANDOJ POR RESPONDO:

1. Kion formas 12 monatoj?
2. Kiom da tagoj havas monatoj?
3. Kiom estas kvin kaj (pli) dek ses?
4. Kiom estas 45 malpli 15?
5. En kioma benko vi sidas en la lernejo?
6. Kiomaĝa vi estas?
7. Je kioma horo vi levas vin (leviĝas) el la lito?
8. Ĉu vi havas hejme dekduon da krajonoj?
9. Ĉu vi ŝatas dolĉaĵon aŭ sukeraĵon?
10. Ĉu vi ŝatas promeni en la arbaro?

13. LECIONO DEKTRIA

A. GRAMATIKO

Dalsze zaimki pytające i wskazujące:

KIOM? — ile?	TIOM — tyle
KIAM? — kiedy?	TIAM — wtedy

Przyrostek **foj** łączy się z liczebnikami lub przysłówkami, np. **foj**o — raz, **foj**e — pewnego razu, unu**foj**e — jednorazowo, du**foj**e — dwa razy, dwukrotnie, unua**foj**e — po raz pierwszy, dua**foj**e — za drugim razem,, mult**foj**e — wielokrotnie, ankoraŭ**foj**e — jeszcze raz, itd.

Przyrostek **ebl** oznacza bierną możliwość, nadawanie się do danej czynności, np. **ebl**a — możliwy, **ebl**e — możliwie, może, legebla — czytelny, povebla — możliwy, komprenebla — zrozumiały.

Biernika używamy:

1. po **czasownikach czynnych przechodnich,** np. mi skribas leteron, mi legis belegan libron;
2. po **czasownikach nieprzechodnich lub nijakich,** gdy to nie powoduje dwuznaczności, np. obei la patron — słuchać ojca, helpi la patrinon — pomagać matce, plori perdon — płakać z powodu zguby! mi ridas lian naivecon — (pri lia naiveco, albo: je lia naiveco) — śmieję się z jego naiwności; pardoni malamikon — wybaczyć nieprzyjacielowi, ale: pardoni al malamiko lian kulpon — wybaczyć nieprzyjacielowi jego winę;
3. na **oznaczenie daty:** lundon, la 26-an de Majo — w poniedziałek...
4. na **oznaczenie trwania czynności:** mi restas en la lernejo kvin horojn;
5. na **oznaczenie miary, ceny, wagi:** la patrino aĉetis unu kilogramon da butero; la libro kostas ducent kvindek zlotojn;
6. na **oznaczenie kierunku lub celu ruchu:** kien vi iras? mi iras lernejon; mi eniris (en) la ĉambron;
7. **w wielu wypadkach wątpliwych:** mi malsanas okulojn — choruję na oczy, mi ĉeestas la kunvenon — uczestniczę w zebraniu.

B. VORTOJ

Sezono — pora roku, **printempo** — wiosna, **somero** — lato, **aŭtuno** — jesień, **vintro** — zima, **verdaĵo** — zieleń, **neĝo** — śnieg, **rivero** — rzeka, **lago** — jezioro, **maro** — morze, **oceano** — ocean, **Vistulo** — Wisła, **aero** — powietrze, **birdo** — ptak, **flugmaŝino** — samolot, **aeroplano** — aeroplan, **fervojisto** — kolejarz, **rabato** — rabat, **vojaĝbileto** — bilet jazdy, **kreskaĵo** — roślina, **tramveturilo** — tramwaj, **noktomezo** — północ, **enhavo** — treść, zawartość, **ciferplato** — tarcza zegara, **montrilo** — wskazówka, **kulpo** — wina, **kunveno** — zebranie, **profunda** — głęboki, **naiva** — naiwny, **nomiĝi** — nazywać się, **sekvi** — następować,

kovri — pokryć, przykryć, **kreski** — rosnąć, **krei** — stwarzać, **pasigi** — przepędzać, spędzać (czas), **translokiĝi** — przenosić się z miejsca na miejsce, **naĝi** — pływać, **scipovi** — umieć, potrafić, **bani, baniĝi** — kąpać się, **droni** — tonąć, **flugi** — latać, **veturi** — jechać, **naskiĝi** — rodzić się, **morti** — umierać, **ellitiĝi** — wyjść z łóżka, **pagi** — płacić, **laŭdi** — chwalić, **okazi** — zdarzać się, mieć miejsce, **obei** — słuchać, być posłusznym, **ĉeesti** — uczestniczyć, **senpage** — bezpłatnie, **kiomfoje?** — ile razy, **kiam?** — kiedy?

C. KONVERSACIAJ EKZERCOJ

Dum la lasta leciono ni diris, ke la jaro konsistas el tagoj, semajnoj kaj monatoj. La plej malgranda parto de la jaro estas la tago, la plej granda estas la sezono. Tri monatoj formas unu sezonon. En la jaro estas kvar sezonoj kaj ili nomiĝas: printempo, somero, aŭtuno kaj vintro. La plej ĉarma kaj bela sezono estas la printempo. Ĝi estas la tempo de la verdaĵo kaj de la floroj. Post printempo sekvas somero — ĝi estas varma sezono. Aŭtuno estas malgaja sezono kaj vintro malvarma aŭ blanka sezono, se estas neĝo. La malvarma neĝo kovras la teron kaj donas al kreskaĵoj varmon.

Dum la bela somera vetero la gejunularo perdas multan tempon pro diversaj sportludoj. Gelernantoj ne ŝatas sidi en la lernejo, sed ili forlasas hejmon kaj urbon kaj pasigas la tempon sur la grandaj placoj, en arbaroj, parkoj aŭ ĉe la akvo. Granda akvo formas riveron, malgranda formas rivereton, tre granda — lagon kaj grandega formas maron aŭ oceanon.

Ĉu Vistulo estas rivereto?

Ne, Vistulo ne estas rivereto, sed ĝi estas la plej granda rivero en Polujo.

Ĉu vi scias, kiuj bestoj sen piedoj vivas en la akvo?

Jes, ni scias: en la akvo vivas fiŝoj.

Fiŝoj ne havas piedojn, sed ili translokiĝas tre rapide. Ili naĝas per naĝiloj. Homoj povas ankaŭ naĝi per manoj kaj piedoj. Naĝado estas tre utila sporto por nia sano.

Ĉu vi scipovas naĝi? Jes, ni scipovas naĝi.

Somere multaj homoj baniĝas en riveroj kaj lagoj. Danĝero minacas al homoj, kiuj ne scipovas naĝi. Tamen eĉ lerta naĝisto povas aukaŭ ekdroni en la profunda akvo, se li ne havas fortan kaj sanan koron.

En la akvo vivas fiŝoj kaj en la aero vivas birdoj. Birdoj flugas per flugiloj. Homoj ankaŭ flugas per flugmaŝinoj aŭ aeroplanoj. La vojaĝo per flugmaŝino estas malpli danĝera ol la vojaĝo per vagonaro. Fervojistoj ne veturas (vojaĝas) tute senpage, sed ili havas pli grandan rabaton ĉe aĉetado de vojaĝbiletoj. Ni veturas senpage nur dum la sonĝo, kiam ni dormas. En nia urbo estas aŭtobusoj kaj tramveturiloj. La lastaj veturas sufiĉe rapide. Kiam mi venis en la mondon, t. e. kiam mi naskiĝis, ne estis ankoraŭ en Krakovo elektraj, sed nur ĉevalaj tramveturiloj. Mi naskiĝis la 30-an de Novembro de la jaro 1889-a. Homoj naskiĝas, vivas kaj mortas. Grandaj homoj, geniuloj, estas senmortaj — ili vivas en la memoro de la homaro.

Nokto kaj tago formas plenan tagon. La plena tago nomiĝas plentago aŭ noktotago.

Kiam ni havas soifon, ni plenigas la glason per la malvarma akvo kaj ni trinkas la enhavon (zawartość) de la glaso.

Kiom da akvo vi povas eltrinki, se vi havas grandan soifon?

Se mi havas grandan soifon, mi povas eltrinki du glasojn da akvo.

Nun mi diros al vi, el kio konsistas la horloĝo. Ĝi konsistas el ciferplato kaj du montriloj. La pli longa montrilo montras minutojn, la malpli longa montras horojn.

Mi mallevas min en la liton (mi enlitiĝas) je la dudekdua horo. Sed ofte mi laboras ĝis la noktomezo. Mi levas min el la lito (mi ellitiĝas) je la sepa matene.

Ĉu vi povas diri al mi, kioma horo estas nun sur mia poŝhorloĝo?

Jes! Sur via horloĝo estas nun la sesa dek tri minutoj, aŭ: dek tri minutoj post la sesa; dek kvin minutoj antaŭ la sepa.

DEMANDOJ POR RESPONDO:

1. Kiomfoje dum la tago vi lavas vin?
2. Kiam vi naskiĝis?
3. Kia sezono estas printempo?
4. Ĉu vi scipovas naĝi en profunda akvo?
5. Kiu monato sekvas post Majo?
6. Ĉu Germanoj mortigis nur gekulpulojn?
7. En kiuj tagoj de la semajno okazas niaj esperantaj lecionoj?
8. Je kioma horo ili komenciĝas?
9. Kial vi lernas esperantan lingvon?
10. Kiel ofte vi vizitas teatron?
11. Ĉu miaj demandoj estas kompreneblaj por vi?
12. Ĉu kreskaĵoj floras?

14. LECIONO DEKKVARA

A. GRAMATIKO

Zaimki i przysłówki nieokreślone powstają z pytających lub wskazujących po usunięciu litery początkowej **K** lub **T**. Są one następujące:

IU	— ktoś, któryś	IAL	— dla jakiejś przyczyny
IO	— coś	IEL	— jakoś
IA	— jakiś	IOM	— cokolwiek, trochę
IE	— gdzieś	IAM	— kiedyś

IEN — dokądś (do jakiegoś miejsca).

Po czasownikach oznaczających **czynności i zjawiska przyrody** albo też ogólne **wyrażenia bezpodmiotowe** kładzie się samo słowo osobowe bez zaimka osobowego, np. pluvas — deszcz pada, neĝas — śnieg pada, okazas — zdarza się, itd.

Przyrostek **ind** oznacza: godzien, wart czegoś, np. vid**inda** — godny widzenia, leg**inda** — godny czytania, kred**inda** — wiarogodny, laŭd**inda** — chwalebny itd.

Przyrostek **um** nie ma określonego znaczenia i używa się go wtedy, gdy inny przyrostek nie dość ściśle określa dany wyraz, np. plen**um**i — spełnić, mastr**um**i — gospodarować, malvar**mum**i — zaziębić się (ale: malvarmigi — oziębiać, studzić, malvarmiĝi — oziębiać się, stygnąć).

Przyrostek **em** oznacza skłonność, przyzwyczajenie, np. labo**rem**a — pracowity, kred**em**a — łatwowierny, servi — służyć, serv**em**a — usłużny, babil**em**a — gadatliwy itd.

Przedrostek **dis** oznacza rozdzielenie, np. **dis**iri — rozejść się, **dis**doni — rozdać, **dis**partigi — rozdzielić na części itd.

Przedrostki i **przyrostki** mogą być także **samoistnymi wyrazami**, np. **ege** — nadmiernie, **male** — przeciwnie, **ree** — znowu, powtórnie, **ilo** — środek, narzędzie, **kialo** — powód, motyw, **ejo** — miejsce, **ulo** — osobnik, **etulo** — malec, **eta** — drobny, mały itd.

Przyrostki imiesłowu:

w czasie	czynnego	biernego
teraźniejszym	**ant**	**at**
przeszłym	**int**	**it**
przyszłym	**ont**	**ot**

Każdy imiesłów może otrzymać końcówkę **o**, **a** i **e**; w ostatnim wypadku jest wyrazem nieodmiennym, np.

leg**anta** persono — leg**anto** — czytelnik
leg**inta** persono — leg**into** — były czytelnik
leg**onta** persono — leg**onto** — przyszły czytelnik

Jaro: estan**ta** — bieżący, teraźn., pasin**ta** — przeszły, venon**ta** — przyszły.

Libro: leg**ata** — czytana, (tra)leg**ita** — przeczytana, leg**ota** — do przeczytania.

Leg**ante** — czytając, (tra)leg**inte** — przeczytawszy, leg**onte** — mając czytać.

B. VORTOJ

Kongreso — kongres, **akademio** — akademia, **kelnero** — kelner, **Hispano** — Hiszpan, **Ruso** — Rosjanin, **Ĉino** — Chińczyk, **muŝo** — mucha, **muso** — mysz, **fingro** — palec, **vivmaniero** — sposób życia, **popolo** — lud, naród, **standardo** — sztandar, **stelo** — gwiazda, **brusto** — piersi, **himno** — hymn, **espero** — nadzieja, **interkompreniĝo** — porozumienie się, **ideo** — idea, **magazeno** — magazyn, sklep, **preĝejo** — kościół, **aventuro** — przygoda, **suĉinfano** — niemowlę, **flago** — chorągiew, **internacia** — międzynarodowy, **komerca** — handlowy, **ornamita** — ozdobiony, **ronda** — okrągły, **sankta** — święty, **nedifinita** — nieokreślony, nieoznaczony, **komuna** — wspólny, **gepatra** — ojczysty, **kvinpinta** — pięcioramienny, **libera** — wolny, **klarigi** — wyjaśniać, **sidiĝi** — usiąść, **voki** — wołać, **fali** — padać, upaść, **kritiki** — krytykować, **verŝi** — lać, **timi** — bać się, obawiać się, **bezoni** — potrzebować, **postuli** — żądać, wymagać, **disvolviĝi** — rozwijać się, **zumi** — brzęczeć, **diskuti** — dyskutować, **prezenti** — przedstawiać, **celi** — dążyć, **atingi** — osięgnąć, **delikate** — delikatnie, **laŭte** — głośno, **lastfoje** — ostatnim razem, **intertempe** — tymczasem, **certe** — na pewno, pewnie, **ĉirkaŭ** — około, **preskaŭ** — prawie.

C. KONVERSACIAJ EKZERCOJ

El demandaj aŭ montraj vortoj ni povas facile formi la nedifinitajn vortojn. Ni detrancas de ili la komencan literon **K** aŭ **T** kaj la vortoj restas sen kapo. Ili estas ankaŭ gravaj vortoj kaj signifas ion nedifinitan. Nun mi klarigos al vi per ekzemploj la novajn vortojn:

Ĉu **iu** el vi, gekursanoj, havas poŝtranĉilon? — Jes, mi havas poŝtranĉilon.

Ĉu en la skatolo estas **io**? — Jes, en ĝi estas **io**, sed ni ne scias kio.

Ĉu vi havas hejme **ian** libron? — Jes, mi havas hejme **ian** libron, sed mi ne memoras kian.

Kie estas mia ruĝa krajono?	Ni ne scias, kie estas via ruĝa krajono — en via poŝo aŭ en la skatolo, sed ni scias, ke ĝi estas **ie**.
Kien vi iras?	Mi iras **ien**, sen celo, mi ankoraŭ ne scias kien.
Kial vi ridis tiel laŭte?	Ni ridis **ial**, sed ni ne diros al vi kial.
Kiel vi faros ĉi tiun taskon sen helpo de via patro?	Ne timu, mi faros **iel** mem ĉi tiun taskon sen helpo de mia patro.
Kiom da tempo vi bezonas por prepari vin el la matematiko?	Mi bezonas **iom** da tempo, sed mi ne scias precize kiom.
Kiam vi estis lastfoje en la teatro?	Mi ne povas diri al vi kiam, mi forgesis la precizan daton, tamen mi bone memoras, ke mi estis **iam** en la pasinta jaro.

Nun mi rakontos al vi iun gajan historieton, kiu okazis iam en Krakovo dum la internacia esperanta kongreso. Ĉu vi ne scias kio estas „kongreso"? Mi diros al vi! Kongreso estas granda kunveno de diversaj homoj, kiuj alvenas el fremdaj landoj por diskuti pri gravaj aferoj. Ili kutime parolas en siaj naciaj lingvoj, pro tio nur malgranda parto de kongresanoj komprenas unu la alian. Ĉar en la tuta mondo, kiel vi jam scias, estas tre granda nombro da diversaj lingvoj kaj ne ĉiuj (wszyscy) homoj havas tempon kaj kapablon ilin ellerni, tial ili ne povas bone interkompreniĝi reciproke. Tute alie prezentas sin la afero dum la internaciaj esperantaj kongresoj. Esperantistoj apartenas al diversaj nacioj kaj parolas aukaŭ diversajn naciajn lingvojn, sed ne dum la kongresoj, nur en siaj landoj. Krom la gepatra lingvo esperantistoj havas unu komunan lingvon, internacian kaj mondan lingvon ESPERANTO. Ili alvenas ĉiam (zawsze) kun verda standardo en la mano kaj kvinpinta stelo sur la brusto.

Ili kantas himnon pri „Espero" kaj celas uzi la esperantan lingvon por atingi la interkompreniĝon inter diversaj fremdaj nacioj. Ĉi tio estas ilia grava kaj sankta ideo; pro tio esperantistoj nomiĝas „samideanoj", ĉar ili estas anoj de la sama granda ideo. Ĝis nun okazis jam pli ol 30 kongresoj, en kiuj partoprenis esperantistoj el ĉiuj (wszystkich) landoj kaj kontinentoj.

Iam antaŭ milito okazis en Krakovo internacia esperanta kongreso. Mi loĝis tiam en Bydgoszcz kaj ĉar mi estis ankaŭ esperantisto kaj apartenis al la esperanta familio, mi alvenis Krakovon por partopreni en la kongreso. Kunvenis multaj fremdlandonoj; la tuta urbo estis ornamita per verdaj flagetoj, speciale la domego de Komerca Akademio, kiu estis nia kongresejo. La kongreso okazis, kiel kutime, en la monato Aŭgusto. La vetero estis varmega kaj tre bela. Kelkajn horojn ni laboris en la kongresejo kaj en liberaj horoj ni promenis tra la stratoj kaj rigardis belajn, grandajn domegojn, luksajn magazenojn kaj multajn interesajn objektojn, kiuj estis malantaŭ la fenestroj. En unu tago ni havis grandan soifon kaj ni volis ion trinki. Ni tuj iris ne en la preĝejon, kie homoj preĝas, sed en la trinkejon, kie oni trinkas. Tie ni sidiĝis ĉe la tablon kaj atendis kelneron. Vi scias, ke la kelnero estas eleganta homo — li havas nigran veston kaj iras tre rapide. Ni sidis ĉe la tablo kaj rigardis la apudan tablon, ĉe kiu sidis ses interesaj kongresanoj el diversaj landoj. La unua estis Anglo, la dua Franco, la tria Hispano, la kvara Germano, la kvina Ruso kaj la sesa Ĉino. Ili sidis ĉirkaŭ la ronda tablo kaj same atendis la kelneron. Ĉar la kelnero ne alvenis, unu el la kongresanoj vokis lin. La kelnero venis tuj, salutis ĉiujn kaj demandis kion ili deziras. Ili rediris, ke ili volas trinki bonan kaj malvarman bieron. Post kelkaj minutoj la kelnero portis ses glasojn da freŝa biero kaj metis ilin antaŭ la ses sinjorojn. En la trinkejo estis varmege. Multaj gastoj fumis cigarojn kaj cigaredojn kaj la aero estis preskaŭ griza. Unu el la gastoj petis kelneron, ke li malfermu la fenestron. Li tuj plenumis la deziron de la gastoj.

Intertempe tra la malfermita fenestro enflugis unu malgranda besto — ĝi estis muŝo (ne muso! katoj ŝatas musojn!). La muŝo flugis kaj flugis en la ĉambro kaj ĝi enfalis — ĉu vi scias kien? — precize en la glason de la Anglo. Angloj estas elegantaj homoj — ili ne ŝatas muŝon en la biero. Ĉu vi scias, kion faris la Anglo? Li levis sin de sur la seĝo, prenis la ĉapelon (la glason li ne tuŝis!), metis ĝin sur la kapon kaj forlasis la trinkejon. La kvin aliaj sinjoroj restis kaj trinkis bieron. Post kelka tempo nova muŝo enflugis en la ĉambron. Ĝi flugis, zumis kaj fine ĝi enfalis en la glason de la Franco. La Franco ne volis plu trinki la bieron kaj faris grandan skandalon. Li kritikis la muŝon, li kritikis la bieron, li kritikis la kelneron, la trinkejon, la mastron, la Krakovon, la tutan Polujon. Intertempe la kelnero portis al li novan bieron. La soifanta Franco forgesis tuj la aventuron kun la muŝo, li prenis la glason kaj trinkis rapide la freŝan bieron. Poste alia muŝo enflugis en la ĉambron kaj enfalis en la glason de la Hispano. Hispanoj ankaŭ ne ŝatas muŝon en la biero — li prenis la glason, verŝis la bieron tra la fenestron kaj petis novan bieron. Poste nova muŝo enfalis en la glason de la Germano. Li prenis la muŝon per siaj fingroj, ĵetis ĝin sur la plankon kaj same petis novan bieron. Poste nova muŝo enfalis en la glason de la Ruso. Li vidis la muŝon en sia glaso, sed li ne faris skandalon, nur li prenis la glason kaj trinkis bieron kun la muŝo. Fine nova muŝo enfalis en la glason de la Ĉino. Li interese rigardis la muŝon en sia glaso, prenis ĝin delikate per siaj fingroj, sed li ne ĵetis ĝin sur la plankon, nur metis en la buŝon kaj manĝis ĝin kun granda apetito. Post ĉi tio li diris: „Ĝi estis bona"!

Ĉu la rakonto plaĉas al vi? Vi demandas min per la okuloj, ĉu ĝi estis la vero. Jes! Ĉar la kongresanoj estis el diversaj landoj, kie estas diversaj kutimoj kaj vivmanieroj. Diversaj popoloj havas diversajn kutimojn.

Ĉu vi konas fremdlandanojn? Certe ne, sed esperantistoj konas diverslandajn homojn, ĉar ili vojaĝas al kongresoj, kiuj okazas en diversaj landoj de la tuta mondo. Mi deziras al vi,

gekursanoj, ke vi ankaŭ partoprenu iam en la esperantaj kongresoj. Vi ne estas plu sucinfanoj en la esperanta lingvo, vi rapide kreskas kaj disvolviĝas kaj fariĝas veraj esperantistoj. Perfektiĝu do en nia kara lingvo kaj vi povos iam vojaĝi al malproksimaj landoj kaj partopreni en la internaciaj esperantaj kongresoj. Mi tre deziras ĉi tion al vi!

Fartu bone! Lernu diligente!

15. LECIONO DEKKVINA

A. GRAMATIKO

Zaimki i przysłówki:

uogólniające (zbiorowe):		**przeczące:**	
ĈIU(J)	— każdy (wszyscy)	NENIU	— nikt
ĈIO	— wszystko	NENIO	— nic
ĈIA	— wszelki	NENIA	— żaden
ĈIE	— wszędzie	NENIE	— nigdzie
ĈIEN	— w każdym kierunku	NENIEN	— w żadnym kierunku
ĈIAL	— z każdej przyczyny	NENIAL	— z żadnej przyczyny
ĈIEL	— wszelkim sposobem	NENIEL	— w żaden sposób
ĈIOM	— wszelka ilość	NENIOM	— żadna ilość
ĈIAM	— zawsze	NENIAM	— nigdy

Zaimki **uogólniające** mają początkową literę Ĉ.

Zaimki **przeczące** zaczynają się od **NEN.**

Jes!	— tak!	Ne!	— nie!
jesi	— twierdzić	nei	— przeczyć
jeso	— twierdzenie	neo	— przeczenie
jesado	— twierdzenie	neado	— przeczenie (czynność)
jesa	— twierdzący	nea	— przeczący
jese	— twierdząco	nee	— przecząco

Odmiennie od języka polskiego może być **w zdaniu tylko jedno przeczenie,** np. mi vidis nenion — nic nie widziałem; neniu el ni havis monon — nikt z nas nie miał pieniędzy.

Tryb przypuszczający (warunkowy) czasu teraźniejszego tworzy się przy pomocy końcówki **us**, np. se mi havus tempon, mi venus volonte al vi — gdybym miał czas, chętnie przyszedłbym do ciebie; se mi povus, mi certe farus ĉi tion por vi — gdybym mógł, na pewno uczyniłbym to dla ciebie.

B. VORTOJ

Naturo — natura, przyroda, **ĉielo** — niebo, **suno** — słońce, **luno** — księżyc, **ĉirkaŭaĵo** — okolica, **nubo** — chmura, **vilaĝo** — wieś, **kampo** — pole, **monto** — góra, **korpo** — ciało (w ogóle), **trunko** — tułów, **kolo** — szyja, **vizaĝo** — twarz, **frunto** — czoło, **mentono** — podbródek, **barbo** — broda (zarost), **vango** — policzek, **viro** — mężczyzna, **lipo** — warga, **lipharoj** — wąsy, **dento** — ząb, **lango** — język, **kuracilo, sanigilo, medikamento** — lekarstwo, **hirurgo** — chirurg, **ventro** — brzuch, **stomako** — żołądek, **pulmo** — płuco, **brako** — ramię, ręka, **piedplato** — stopa, **osto** — kość, **haŭto** — skóra, **karno** — ciało człowieka, **vejno** — żyła, **sango** — krew, **nervo** — nerw, **fadeno** — nić, drut, **organo** — organ, narząd, **anatomio** — anatomia, **scienco** — nauka, wiedza, **pacjento** — pacjent, **motoro** — motor, **telegrafo** — telegraf, **perfekteco** — doskonałość, **utilo** — pożytek, korzyść, **ĝentila** — grzeczny, **supera** — wyższy, **supra** — górny, **flanka** — boczny, **perfekta** — doskonały, **demokrata** — demokratyczny, **bonvoli** — zechcieć, raczyć, **flui** — płynąć, **posedi** — posiadać, **etendiĝi** — rozciągać się, **daŭrigi** — kontynuować, ciągnąć dalej, **kompari** — porównać, **trovi** — znaleźć, **trairi** — przechodzić, przejść, **sperti** — doświadczyć, **spiri** — oddychać, **gvidi** — kierować, być przewodnikiem, **konsili** — radzić, **konduki** — prowadzić, **nepre** — koniecznie, **sammaniere** — w ten sam sposób, **kiel eble plej...** — jak naj..., **jen** — oto, **tro** — zbyt, **po** — po.

C. KONVERSACIAJ EKZERCOJ

Ni ĉiuj, kiuj longe sidas en la fermitaj ĉambroj: lernejoj, oficejoj, vendejoj, fabrikoj k. t. p. (kaj tiel plu), tre ŝatas la liberan naturon. La libera naturo havas ankaŭ plafonon kaj

ĝia koloro estas blua. La blua plafono nomiĝas ĉielo (komparu kun la vorto **ĉiel**!). Sur la blua ĉielo ni vidas dum la tago grandegan lampon — ĉi tio estas la suno. Nokte, se ne estas nuboj sur la ĉielo, ni vidas ofte lunon kaj stelojn. Sur la tuta ĉielo estas miliardoj da steloj kaj steletoj kaj diversaj planedoj.

Dimanĉe multaj homoj forlasas urbon kaj iras aŭ veturas vilaĝon. Malgrandaj domoj en la libera naturo formas vilaĝon. Inter urboj kaj vilaĝoj etendiĝas vastaj kamparoj kaj arbaroj. Altaj partoj de la lando formas montojn. En Zakopane ni vidas belegan montaron. En urboj loĝas urbanoj, en vilaĝoj — vilaĝonoj kaj en montaro — montaranoj. Montaranoj en ĉirkaŭaĵo de Zakopane havas tre belajn vestojn, tute aliajn ol en alia parto de Polujo. La ĉefurbo de Polujo estas Varŝavo. Varŝavanoj ankaŭ tre volonte vizitas vilaĝojn, ĉar tie estas pli bona kaj freŝa aero. Ni tre ŝatas pasigi la tempon sub la blua ĉielo. Dum somerferio ni ripozas malproksime de grandaj urboj kaj proksime al arbaroj, riveroj aŭ montaro kaj pasigas la tempon tre agrable, okupiĝante pri diversaj sportoj. La pilko estas tre dezirata ludobjekto.

Ĉiuj homoj povas erari. Lernante fremdajn lingvojn, ni faras ofte multajn erarojn. Nur en la esperanta lingvo oni skribas ekzercojn preskaŭ senerare. Esperantistoj estas ĝentilaj homoj. Ili ne diras: donu al mi vian kajeron! — sed: bonvolu (havu bonan volon) doni al mi vian kajeron!
Ĉu plaĉas al vi ĉi tiu ĝentila frazo? Jes!... Faru do la praktikon sammaniere!

Nun ni trairas al grava parto de la anatomia scienco. La homa korpo konsistas el tri ĉefaj partoj: el kapo, trunko kaj membroj. Inter kapo kaj trunko estas kolo. Al membroj apartenas manoj kaj piedoj. Sur la kapo ni havas harojn. Sed ne ĉiuj homoj havas belajn harojn — ofte ni vidas virojn preskaŭ sen haroj. La antaŭa parto de la kapo estas vizaĝo. La supra parto de la vizaĝo estas la frunto, la malsupra — mentono, la flankaj partoj estas vangoj. Sur la mentono estas haroj — ili formas barbon. Sed nur malgranda nombro da viroj havas barbon (ili

estas malmodernuloj!). La buŝo havas du lipojn: supran kaj malsupran. Sur la supra lipo de pli aĝaj sinjoroj estas ankaŭ haroj — ili formas lipharojn. En la buŝo estas dentoj kaj lango. Homoj havas ofte tro longan langon. Ĉu vi ne spertis ĉi tion? Dentisto rigardas malsanajn dentojn de siaj pacientoj kaj li kuracas ilin (t. e. dentojn). Malsanan korpon kuracas aŭ sanigas kuracisto aŭ sanigisto per diversaj medikamentoj (kuraciloj aŭ sanigiloj). Ĥirurgo kuracas homan korpon per tranĉilo — li faras operacion. Ĉu vi komprenas?

La trunko konsistas el brusto kaj ventro. En brusto estas du pulmoj, kiuj prenas la aeron kaj koro, kiu estas la plej grava organo de nia korpo (vivmotoro). En ventro estas la stomako. Ni manĝas kaj trinkas per la buŝo kaj ĉiu (aŭ ĉia) manĝaĵo aŭ trinkaĵo iras ne en la kapon, sed en la stomakon.

Ĉe fino de la brakoj estas manoj. Ĉiu mano kaj ĉiu piedplato havas po kvin fingroj. Entute ni havas dudek fingrojn. Blankaj objektoj en la homa korpo estas ostoj (fiŝoj havas fiŝostojn!). La korpo havas naturan veston — ĝi estas haŭto. Sub la haŭto ne estas viando (viandon ni manĝas!), sed karno. En la karno estas vejnoj kaj nervoj, kvazaŭ telegraffadenoj. En la vejnoj fluas la ruĝa sango.

Jen estas la tuta materialo de la elementa kurso. La elementa kurso estas jam finita. Post ĉi tiu kurso devas sekvi la supera kurso. Se vi volas fariĝi perfektaj esperantistoj, vi devas nepre daŭrigi la lernadon de la lingvo Esperanto. En la supera kurso („Lecionoj de la mondlingvo Esperanto — III-a eldono") vi trovos pluajn gramatikajn regulojn kaj multajn bezonajn ekzercojn. Mi konsilas al vi legi, skribi kaj paroli esperante kiel eble plej ofte, ĉar ĉi tio estas la plej bona praktiko, kiu kondukas ĉiun al vera perfekteco en la lingvo. Antaŭ kelkaj monatoj vi estis kvazaŭ „suĉinfanoj" en la esperanta lingvo. Hodiaŭ vi fariĝis jam altkreskaj gejunuloj. Vi scipovas legi kaj skribi esperantajn tekstojn kaj vi bone komprenas preskaŭ ĉion, kion mi diras al vi en ĉi tiu lingvo. Mi deziras al vi, ke vi restu fidela al ESPERANTO por via propra bono kaj utilo kaj por la bono kaj utilo de nia Demokrata Polujo!

DODATEK

Pozostałe **zaimki, przedrostki** i **przyrostki** nie uwzględnione w materiale konwersacyjnym elementarnego podręcznika:

Zaimki z końcówką **es** oznaczają posiadającego: **kies?** (= de kiu?) czyj? **ties** — tego, **ies** — czyjś, **ĉies** — każdego, **nenies** — nikogo.

Przedrostek **bo** oznacza pokrewieństwo pochodzące z małżeństwa, np. **bo**patro — teść, **bo**filo — zięć, **bo**filino — synowa, **bo**frato — szwagier.

Przedrostek **mis** oznacza niewłaściwość, nieprawidłowość, np. **mis**kompręno — nieporozumienie, **mis**aŭdi — przesłyszeć się, **mis**uzi — nadużyć.

Przedrostek **fi** i przyrostek **aĉ** oznaczają pogardę lub brzydotę, np. **fi**ĉevalo, ĉevala**ĉo** — szkapa, **fi**buŝo, buŝa**ĉo** — pysk, morda, nuba**ĉo** — chmurzysko, parola**ĉi**, kria**ĉi** — pyskować.

Przyrostek **er** oznacza cząstkę zbiorowej całości, np. faj**rero** — iskra, mo**nero** — pieniędz.

Przyrostek **estr** oznacza zwierzchnika, np. lerne**jestro** — kierownik szkoły, urbe**stro** — burmistrz, ŝipe**stro** — kapitan okrętu.

Przyrostek **id** oznacza potomka rodzaju męskiego, np. reĝo — król, reĝ**id**o — królewicz, reĝ**id**ino — królewna, koko — kogut, koki**do** — kurczę.

Przyrostek **ing** oznacza przedmiot służący do obsady innego przedmiotu, np. plumo — pióro, plum**ingo** — obsadka, kandelo — świeca, kandel**ingo** — lichtarz.

Przyrostek **em** oznacza skłonność, przyzwyczajenie, np. labo**rema** — pracowity, dor**mema** — śpiący, kre**dema** — łatwowierny.

Przyrostek **ĉj** upieszczotliwia imiona męskie, np. Peĉjo — Piotruś, Johanĉjo — Janek, Joĉjo — Jaś, paĉjo — tatuś.

Przyrostek **nj** czyni to samo z imionami żeńskimi, np. Mari**njo** — Marysia, Ma**njo** — Mania, patri**njo** — mateczka, pa**njo** — mamusia.

NAJWAŻNIEJSZE ORGANIZACJE ESPERANCKIE

A. Krajowe:

1. **Związek Esperantystów w Polsce**
   Zarząd Główny — Warszawa, Aleja Róż 7 (Dom TUR)
   Organ — miesięcznik „Pola Esperantisto"
2. Z. E. P. — Oddział w Warszawie, ul. Marszałkowska 81, m. 32
3. Z. E. P. — Oddział w Krakowie — Rynek 34 of. III p.
   (i w innych miastach Polski)

B. Zagraniczne:

1. **Internacia Esperanto Ligo** (I. E. L.)
   Heronsgate, Rickmansworth, Herts, Anglujo
   Organ — miesięcznik „Esperanto Internacia"
   Główny delegat na Polskę: Roman Sakowicz, adwokat, Warszawa (21) Okęcie
   Delegat na Kraków: Prof. Mieczysław Sygnarski, Słoneczna 4, m. 23
2. **Uniwersala Ligo** (U. L.)
   Riouwstraat 172 — Hago — Nederlando
   Organ — miesięcznik „La Praktiko" — najpiękniej redagowane pismo esperanckie
   Obowiązki „konsula" na Kraków pełni prof. M. S.

Tegoż autora:

W przygotowaniu do druku:

LEKCJE JĘZYKA ŚWIATOWEGO ESPERANTO — wydanie III-cie przerobione i uzupełnione słowniczkami.
(Podręcznik zatwierdzony przez Min. Oświaty w Warszawie pismem z dnia 27 lipca 1946 nr VI. — 1148/46, do użytku w szkołach średnich ogólnokształcących i zawodowych oraz szkołach dla dorosłych wszelkich typów).